

TEA-BULTENO

16^A JARO

MAJO - JUNIO 2013

NUMEROJ 5-6

Nur la senutileco de la unua diluvo malhelpas Dion sendi al ni la duan.
Nicolas Chamfort, franca verkisto (1741-1794)

Kara Legantaro!

Dum vi komencis programi vian someran libertempadon, la TEA-Bultena redaktanto estis jam feliĉe ferianta en Israelo, kie ŝi ĝuis la 7^{-an} Azian Kongreson kaj neforgeseblan turismadon tra la tuta lando. Tie estis tiom bele, ke ŝi entute forgesis pri la promeso, neniam plu malakurate aperigi la asocian informilon kaj - ho, honto! - ŝi ankoraŭ eĉ ne pensis surpaperigi siajn impresojn pri la spertoj tie travivintaj! Nu, ankoraŭ iom da tempo mi bezonas por mense prilabori mian raporton, tial vi devos pacienci ĝis la venonta bulteno kaj, por ricevi vian pardonon, mi prezentas al vi signifoplenan poeziaĵon de Gianni Rodari, tradukitan de Viglo. Legu ĝin atente kaj ĝuu la parolon de tiu eminenta verkisto por infanoj. *"En fabelo ĉiaj hipotezoj estas validaj: ĝi povas doni al ni la ŝlosilojn por eniri realaĵon tra novaj vojoj, ĝi povas helpi la infanon ekkoni la mondon"*.

La lando de mensoguloj

Estis iam, tie iuloke de Kiu-scias, lando de mensoguloj. En tiu lando neniu diris la veron, eĉ ne cikorian per ĝia nomo ili nomis: ĉie regis mensogo. Je sunleviĝo, tujtuje iu kriantis: "Kiel bele la suno subiris!" Vespere, kiam

La Arbo de l' Mensogoj

Estis iam, en la arbaro "Kiu-scias-kie", ĉirkaŭita per bela tapiŝo el papavoj kaj sunfloroj alta kaj fortika arbo, daŭrfolia, kiu odoris je cinamo kaj mielo. Magie li kreskis en unu nura nokto de semo tien portita de mistera vento. Li estis tiom ĉarma, ke je liaj piedoj kunvenadis ĉiuj lokaj bestoj. Ne konata estis la devenfamilio, malgraŭ ke ĉiuj plej eminentaj spertuloj pri arbaroj trafolumis ĉiujn enciklopediojn de la mondo por trovi informojn pri li. Liaj folioj similis al grandaj, pendantaj oreloj, sur la tronko dika nazo friponete kuspiĝis, kiam li, kiel ofte okazis, ekridegis. Finfine oni eksciis, ke tiu arbo apartenas al la genro



Daŭrigo je pĝ. 5-a ➤

pli ol reflektoro
la luno heligis,
homoj plendantis:
"Huj do, kiel nokto malhelas,
nenion vidi ja eblas".

Kiam iu ridis,
ĉiuj lin kompatis:
"Kiel domaĝe, ve al mizerulo,
kia malbonaĵo okazis?"

Kiam iu plorantis:
"Kia originalulo,
ĉiam gaja,
ĉiam festanta.
Certe li estas
milionojn ricevanta".
Akvo la vinon,
seĝo la tablon,
ĉiam ili nomis,
ĉiel bele konfuzante:
ĉiam, ĉie kaj ĉion
alivorte nomante.
Konduti male
ne permesite,
sed tiom ili al kutimiĝis,
ke same bone, ja, kompreniĝis.

Do, alvenis al tia lando
nova kompatindulo,
neniam leginta
la kodon de mensogulo,
kaj senkonsidere,
ĉie promenante,
li vagadis nomante
tago la tagon
piro la piron,
nu, neniam
malveraĵon dirante.
Abrupte li estis
kiel hundo kaptita
kaj frenezulejen
enŝlosita.
"Frenezule li parolas,
la veron ĉiam dirante."
"Ĉu?... ne... maleblas..."

"Je l' honoro!
Por tiu tre interesa kazo,
venos el malproksimo
cent kaj cent
da kuracistoj
por cerbumi pri lia cerb'..."
La strangan malsanon
en tridek tri partoj
felietone detaligis
la "Mensoga Gazeto".
Finfine por kontentigi
la popolan scivolemon
la Homo-veron-diranta
kontraŭpage
ekspoziciitis
ĉe la zoa hom-ĝardeno
(eĉ tiu nomo
estis renversita!!!)
en bela, granda kaĝo
tute ferbetonita.
Popolamaso kunpuŝiĝis.
Sed tio tute ne gravas.
Pli kaj pli konsternas,
ke la malsano
tiom infekta manifestiĝis,
ke iom post iom
tra la tuta urbo
la vero-bacilo disvastiĝis.
Kuracistoj,
policistoj,
aŭtoritatuloj,
ĉiajn eblojn elprovadis
cele al epidemia bremsado.
Ja ne! nenio fareblis.
De l' pli maljuna
al pli juneta
nun homoj ja nomis
pano la panon, vino la vinon,
blanko la blankon,
nigro la nigron.
Liberiĝis la kaptito,
tuj elektita prezidanto,
kaj kiu tion ne kredas
tute nenion komprenas.

Laste trovitaj!

Ĉi-foje mi ŝatas prezenti al vi kelkajn ekslibrisojn de famaj (aŭ malpli famaj) esperantistoj. Ekslibriso estas tiu surskribo aŭ bildo, kiun iu surmetas sur la librojn de sia biblioteko, por montri, ke ili estas lia/ŝia propraĵo (nPIV, pĝ. 273). Estas maniero por iel doni personan trajton al la libro kaj ĉefe, kaze de prunto, ĝi donas ian certecon, ke pli aŭ malpli (mal)frue la libro revenos al la origina posedanto. Kial "ekslibriso"? El la latina *ex libris*, 'el la libroj de...'. Kutime temas pri etikedo, diversdimensia, ornamita per figuroj, desegnaĵoj kaj/aŭ devizoj sur kiu kompreneble aperas, aŭ skribeblas la nomo de la proprietulo. La ekslibrison kutime oni gluas sur la internan parton de la kovrilo aŭ de la unua libra paĝo.

La unuaj ekslibrisoj aperis ĉ. en la 15^a jarcento en Aŭstrio kaj Germanio. En 1500 la plej ofta bildo prezentis la familiajn blazonojn de nobeloj, kiuj tiutempe estis preskaŭ la solaj posedantoj de bibliotekoj. En la baroka periodo, la ornamaĵoj estis aparte riĉaj, dum en la 18^a jc la dekoracioj estis pli simplaj kaj esencaj, laŭ novklasika stilo. Sed kvante kaj kvalite kreskis la kreado de ekslibrisoj fine de la 19^a jc, koincide kun la ekesto kaj disvastiĝo de la *Flor-* aŭ *Liberty-*stilo. Ekde tiam disfloris ankaŭ kolektemo je internacia nivelo, kun fondo de asocioj kies celoj estis interŝanĝo de ekslibrisoj kaj antaŭenpuŝi ilian produktadon.

En la itala urbo Arezzo vivas fama kolektanto, kiu posedas ĉ. 130 000 ekzemplerojn, el kiuj 13 000 faritaj lianome de artistoj el la tuta mondo per plej diversaj teknikoj.


Do, ni vidu kelkajn aperintajn en Esperantujo.



Tiu ĉi apartenis al Achille Tellini. La fama esperantisto el Udine, kies biografio jam aperis en TEA-Bulteno (T-B Majo-Junio kaj Novembro-Decembro 2010), mem desegnis plurajn ekslibrisojn, sed tiu ĉi estis farita de lia amiko Alfredo Baruffi: sur la bildo aperas granda granatarbo, kies radikoj brakumas la mondon, kaj sur la interplektita branĉaro la kvinpinta stelo. La bildo estas tipe nov-

stila.

Ĉiflanke ekslibriso de Adolf aŭ Dolfa Bartoŝik, ĉeĥa esperantisto, kiu naskiĝis en Borŝice u Buchlovic je la 1^a de majo 1907 kaj mortis en Prago la 3^{an} de februaro 1989. Li estis instruisto, grafikisto kaj filatelisto. Ĉi-kampe li estis ankaŭ redaktoro de Esperanto-rubriko en filatelista bulteno. D. Bartoŝik esperantistiĝis en 1927 kaj, sekve de sia unua varbado pri Esperanto en Kromeříž inter studentaro, ekinstruis sukcese la lingvon en du kursoj. Inter la du mondmilitoj li instruis Csehmetode en Jugoslavio kaj Nederlando. Li fondis la Slovakon Esperanto-Klubon en Uherské Hradiště kaj gvidis programojn ĉe la klubo en Prago. En 1979 Ĉeĥa Esperanto-Asocio nomumis lin Honora




Membro, pro lia valora agado poresperanta. Dum sia tuta vivo Dolfa Bartoŝik produktis nombrajn ilustraĵojn, gravuris ekslibrisojn, desegnis stampojn por la ĉeĥa poŝto kaj eĉ, dum la dua mondmilito, komisiite de la ĉeĥa registaro, multajn patriotajn kaj propagandajn desegnojn. Kiel filatelisto, li gajnis unuarangajn premiojn ĉe internaciaj ekspozicioj per siaj eksponaĵoj ankaŭ pri la temo Esperanto. Du el tiuj estas admireblaj en la sekvaj retejoj: ĉe www.japhila.cz/hof/0395/index0395a.htm "Pasinteco kaj nuntempo de Esperanto", kaj ĉe www.japhila.cz/hof/0394/index0394a.htm "Kion rakontas filatelo pri Esperanto (konciza historio)". Ĉe <http://it.blurb.com/b/3651381-esperanto-glumarkoj-de-dolfa-bartosik> oni vendas libron kun liaj Esperanto-glumarkoj.



Jen tre malnova ekslibriso de Georg Davidov. Li estis armeno, naskita en 1879 en Armavir, Norda Kaŭkazo. Li eklernis Esperanton en 1892 kaj en 1903 iris al la urbo Saratov, Rusio, kie li komencis fervore propagandi. En 1905-07 G. Davidov eldonis informajn kaj varb-broŝurojn kaj sigelmarkojn,

esperantigis kelkajn, precipe armenajn, literatur-aĵojn kaj aperigis bibliografiajn katalogojn pri Esperantaj eldonaĵoj (1887-1911). Li fakte posedis ampleksecan bibliotekon, por kiu li strebis akiri ĉion ajn presitan en aŭ pri Esperanto. Li mortis en 1967.

Kaj laste mi prezentas al vi tute novajn, kvankam la stiloj ne estas tiom modernecaj. La ĉi-flanka ekslibriso estis farita de Eran Vodevoz, kiun mi ekkonis dum la 7^a Azia Kongreso de Esperanto en Jerusalemo. Li estas juna israela aktivulo, havas tre ĉarman familion, en kiu Esperanto ludas gravan rolon: li alparolas Esperante al edzino, 4-jara etulo kaj 15-monata bebino, kaj eĉ al la hundo. Dum la kongresa kunveno, la 22^{an} de aprilo, li estis elektita kiel unu el la estrarano de KAEM - Komisiono de UEA pri Azia E-Movado.



Kaj nun mia persona ekslibriso! Ĝi estis komputile farita de la triesta grafikisto Eraldo Sepulcri en 1990. Romia diino invitas la virinojn al kleriĝado kaj legas libron sub la plurfolia arbo de la Scio. En nov-klasika stilo, sube maldekstre videblas la kvinpinta stelo kaj dekstre la triesta halebardo.



Ankaŭ kolektado de ekslibrisoj estas tre interesa ŝatokupo, ĉu pri esperanto aŭ ali-tema, tute ne gravas! En mia kolekto el tiuj troviĝas tre malmultaj: kelkaj estas sufiĉe malnovaj, nome de la komenco de la pasinta jarcento, kies bildoj respegulas ideojn kaj idealojn kiuj nuntempe estas kvazaŭa raraĵo.

PLIOFTAJ PARONIMOJ

*Ĉiam surprizplena la esplorado en tiu ĉi aparta semantika kampo,
kie la vortoj ŝajne konkuradas unu kun la alia, en asonanca kirlokuro:*

moskatelo – moskeo – moskito – mosko – musko – muskato – muskedo

Mirho	(Bo) bonodora gumrezino	Muso	(Zo) g. (<i>Mus</i> el ronĝuloj) de malgrandaj mamuloj
Mirto	(Bo) g. (<i>Myrtus</i> el mirtacoj) de arbusto, tre aroma	Muŝo	(Zo) insekto (<i>G. Musca</i> k.a. el dipteroj)
Mirtelo	(Bo) sp. de vakcinio (<i>Vaccinium myrtillus</i>), arbusteto kultivata por manĝeblaj vitaminriĉaj fruktoj	Muzo	(Be) ĉiu el la naŭ helenaj diinoj, ispirintaj artistojn
Modalo	ĉiu el la diversaj manieroj, kiel la substanco aperas al la homa menso	Nacio	popolo, aparta socia komunumo
Modelo	objekto, farita por esti imitata	Nazio	ano de la hitlera naci-socialista partio
Modemo	aparato por sendi k ricevi ciferecajn datenojn	Naso	(Te) konusforma korba fiŝkaptilo
Mitrao	(Re) genio en la mazdaismo, iĝinta la dio de misterreligio (ĉ. 1 ^a jc aK)	Nazo	(An) parto de la homa vizaĝo
Mitro	(Re) dupinta kapvesto de kristana episkopo	Negra	rilata al nigrul(in)o
Mokao	(Ku) ekstrakvalita kafo el <i>Moka</i>	Nigra	(Te) fulgokolora, plene sorbanta la lumon
Moko	maĵata ridindigo	Nepo	filo de filo aŭ filino
Momanto	(Mt) vektorproduko de forto per distanco	Nevo	filo de frato aŭ fratino
Momento	tre mallonga nedifinita daŭro de tempo	Neŭtra	ne apartenanta al unu nek al alia el du kategorioj
Mordi	vundi per dentoj	Neŭtrala	ne volanta partopreni en diskuto, batalo ks
Morti	ĉesi vivi	Nimbo	(Me) difraktaj lumringoj en nebulo; (Be) aŭreolo
Murdi	mortigi	Nimbuso	(Me) pluvoporta griza nubo
Morulo	(Md) stadio de la embrio	Nimfeo	(Bo) g. (<i>Nymphaea</i> el nimfeacoj) de akvoherboj kun limbofosantaj folioj k flosantaj floroj (akvolilio)
Moruo	(Ik) sp. de gado (<i>Gadus morhua</i>)	Nimfo	virina diaĵo de maroj, riveroj; bela virino
Moruso	(Bo) g. (<i>Morus</i> el morusacoj) de arbo kun manĝeblaj ŝajndrupaj fruktoj	Nobela	rilata al altrangul(in)o
Moskatelo	(Te) muskatvino	Nobla	grandanima
Moskeo	(Re) preĝejo de Islamanoj	Nombro	(Mt) unuo aŭ aro de unuoj
Moskito	(Zo) kolektiva nomo de pikantaj insektoj (kuloj)	Numero	cifero montranta vicon de iu objekto inter aliaj
Mosko	(Zo) odora substanco sekreciata de bestoj	Numeralo	vortospeco indikanta precizan kvanton
Musko	(Bo) klaso de herboj	Numeratoro	<i>nombro super la streko en frakcio</i>
Muskato	(Zo) frukto de muskatarbo (miristiko)	Novalo	(Ag) nekultivata k ripozanta plugtero
Muskedo	malnova peza pafilo	Novao	(As) abrupte aperinta stelo, poste estingiĝanta
Mosto	(Te) suko el nefermentintaj vinberoj	Novelo	(Be) mallonga literatura verko
Moŝto	kvalifiko por altranguloj	Novulo	tiu, kiu nove ek-faras -praktikas -spertas ks
Mulao	(Re) piulo studanta Islamon		
Mul(in)o	(Zo) hibrido de azeno k ĉevalino		



La franca Esperanto-Kulturdomo en kastelo **Greziljono** invitas vin al interesaj semajnoj, julie kaj aŭguste, ĉiam kun E-kursoj kaj aktivaj:

6-13.julio: **Turisma Semajno** por ŝatantoj de turismado kaj ekskursoj al reĝaj kasteloj, de francaj historio, kulturo kaj lingvo, vidu en gresillon.org/s1
13-20.julio: **Art-Amatora Semajno** por hobiaj artistoj kaj ŝatantoj de teatro, dancado, kantado, muziko kaj grafika arto, vidu en gresillon.org/s2

20-27.julio: **Alternativa MOJOSejo** (por junuloj kaj pri alternativaj temoj) por vegetaranoj, verduloj kaj piratoj, ekologio-ekonomiko-alternativuloj, migremuloj, biciklantoj kaj tendumantoj, vidu en gresillon.org/s3

3-10.aŭgusto: **Festa Semajno** speciale por infanoj kaj familioj kun beboj, por adoleskantoj kaj junuloj, vidu en gresillon.org/s4

10-17.aŭgusto: **Teatra Aktora Semajno** por amantoj de teatro originala en Esperanto, dezirantaj labori kun profesia aktoro, vidu en gresillon.org/s5

PREMIO "GIORGIO CANUTO"

PER TESI DI LAUREA
IN INTERLINGUISTICA ED ESPERANTOLOGIA
IV edizione

Si indice per l'a.a. 2012-2013 la quarta edizione del concorso per la migliore tesi di laurea (triennale e specialistica) discussa in una università italiana negli ultimi tre anni accademici: il premio è dedicato al Prof. Giorgio Canuto, già magnifico Rettore dell'Università degli Studi di Parma dal 1950 al 1956 e Presidente del Movimento Internazionale Esperantista dal 1956 al 1960.

Al primo vincitore sarà assegnato un contributo di € 150, e un riassunto del suo lavoro sarà ospitato in forma di articolo sulla rivista INKŬOJ. La Giuria si riserva di valutare ulteriori lavori degni di pubblicazione, e trovare loro degna collocazione.

La giuria è individuata nelle persone dei Professori Fabrizio Pennacchietti, Università degli Studi di Torino, Presidente; Davide Astori, Università degli Studi di Parma, Segretario; Paolo Valore, Università Statale di Milano, Direttore di Inkoj.

La partecipazione è gratuita.

Si concorre inviando una copia cartacea del lavoro a: Associazione Esperanto "GIORGIO CANUTO", c/o Madella Oberrauch, via Prampolini 8 - 43122 Parma e una digitalizzata a: silkovojo@aliceposta.it entro il 15.07.2013.

L'operato della giuria è inappellabile. La premiazione è prevista per ottobre 2013.

Il premio è realizzato grazie al contributo della Italia Esperanto-Federacio - Federazione Esperantista Italiana - via Villaresi 38 - 20143 Milano.

Tel.: 02/58100857 e-mail: info@esperanto.it; fei@esperanto.it

Demandoj direktitaj al triestanoj, sed... ne nur!

Jen alia demando-sinsekvo pri kuriozaĵoj, anekdotoj, etaj misteroj, eventoj rilataj al Triesto, eble por pluraj el vi ne tre konataj. Nu, vi provu respondi al tiuj ĉi!

- 1) La plej amata dumsomera okupo de triestanoj estas plonĝi en la maron. Kaj estas iuj plonĝistoj kiuj ŝatas altiri la atenton de la duondormemaj sunumantoj (aŭ sunamantoj) per siaj akrobataĵoj. Diversaj estas la stiloj, sed iu estas aparte populara, precipe inter la junularo, tiom ke fine de la varma sezono oni organizas eĉ konkurson ĉe urba bandomo: la nomo estas "clanfa" (elp. klanfa) en la triesta dialekto. Kion ĝi signifas?
- 2) En la "Area Science Park" troviĝas pruo de historia ŝipo. Unue, ĉu vi scias, kio estas "Area Science Park" kaj due, al kiu ŝipo apartenis tiu pruo?
- 3) Nun demando al frandemuloj: La "luganiga de cragno" (en triesta dialekto. Temas pri kolbaseto el viando) estas mendebila ĉe ĉiuj bufedoj en Triesto. Fakte ĝi estas la plej tipa kaj tradicia plado en triesta provinco. De kie ĝi devenas kaj el kio ĝi konsistas?
- 4) Kiel nomiĝis la plej granda varŝipo iam ajn konstruita en la Ŝipfarejo Sankta Marko, en Triesto? La respondojn vi trovos sur la 6-a paĝo.



Občina Isola
Comune di Isola

17a ESPERANTO-KONFERENCO de ALP-ADRIO Izola - Slovenio - 1-2 junio 2013

Centro por kulturo, sporto kaj manifestacioj
Izola, Ul. Oktobrske Revolucije 1

Konferenca temo: Izola, paca kunvivejo de tri Kulturoj

Vendrede, 31^a de majo	De la 18-a ĝis la 20-a horo: akcepto kaj pagoj de partoprenantoj en la konferenca salono.
Sabate, 1^a de junio	De 8-a ĝis la 9-a horo: akcepto kaj pagoj de partoprenantoj en la konferenca salono.
10h00	Oficiala Malfermo, kun salutoj de aŭtoritatoj. Pri la Konferenca temo parolos Francka Rižnar.
10h30	KULTURA PROGRAMO ★ ŽPS - Virina Kant-grupo "FLORO EN LA HAROJ" - gvidas Marjetka Popovski; ★ ŽPS - Virina Kant-grupo: "IVAN GRBEC ŜKEDENJ" - gvidas Silvana Gregorić; ★ Kantoj de la du grupoj kune, gvidas Marjetka Popovski; ★ "NEPTUNAJ LUDOJ" - gvidas Dare Brezavšek; ★ Programo de element-lernejanaj el Koper.
13h30	Komuna tagmanĝo
16h00	Pritraktado de la Konferenca temo. Sekvos la Ĝenerala Asembleo de la Alp-Adria Komitato (diskutoj, proponoj, ks)
18h00	Fermo de la 17 ^a Esperanto-Konferenco de Alp-Adrio
18h30	Komuna promenado tra la urbo por vizito de vidindaĵoj kaj partopreno en loka festo: OLIVOJ, VINO KAJ FIŝOJ
Dimanĉe, 2^a de junio	Triestanoj invitas al Triesto!

KONFERENCA ALIĜKOTIZO egalas al 10 eŭroj.
Komuna tagmanĝo: 9 € (sen trinkaĵoj)

**Kontaktadreso: Francka RIŽNAR, Kopraska 32,
6310 Izola Slovenio**
retadreso: fani.riznar@gmail.com

**Konferenca sekretario: Edvige Ackermann -
nored@tiscali.it**

Venu por ĝui Esperantan etoson kaj mirindan urbeton ĉemaran: la vetero estos agrable varma kaj la irado tra la vojetoj de Izola ĉarmos vin ĉiujn. Estas eblo plilongigi la restadon, interkonsente kun la organizantino. Ĝis baldaŭ!

La konkursoj de samideano

Internaciaj Premioj pri Literaturo kaj Artoj, subtenataj de "Associazione Esperantisti", "Villaggio delle Lettere", "&voluzionisti" kaj kunlabore kun la Pistoja Esperanto-Grupo "Umberto Stoppoloni".

Mastraĝio

Senpaga konkurso pri rakontarto aŭ ĵurnalisma enketo kaj foto-grafio.

Ĉu mastraĝio?!? Mastraĝio estas alproprigo farita de iu kiu emias monon kaj prenas la aktivan diferencon inter trudita valoro kaj la kosto por la presado de la mono. Pro laŭgrada kaj preskaŭ mistera tutplaneda manovro, ĉi tiu povo, gajni per monpresado, iam rezervita al la reĝoj kaj poste al la registaroj, kiuj legitime reprezentis la popolon, nun definitive transiris al specifaj kaj elstaraj privatuloj, per la akiro de la Centraj Bankoj. Ŝajnas, ke la nuna nacia ŝuldo kaj la malriĉiĝado de la popoloj havas en tio unu el la ĉefaj kaŭzoj.

TEMO

Tie ĉi ni indikas la "mastraĝion" kiel simbolon de la turmentadoj, kiuj estas truditaj de ia ajn regpovo, kaj de personoj, kelkfoje sadistoj, kiuj ĝin reprezentas. Perfortaĵoj en formo de maljustaj leĝoj; asfiksioj fare de la burokrateco; maljustaĵoj de institutoj oficiale kreitaj por protekti la rajtojn de la civitanoj, sed kiuj ja povas havi senkorajn agad-ojn, kontraŭdirantajn ilian hom-aman principon. Senindul-

gaj barbaraĵoj plenumitaj de bankoj, kies ekzisto havas, kiel pravigon, la subtenadon de la ekonomio, celo, kiu estas mal-konfirmita de nombraj bankrotaj plifacilitaj de iliaj restriktigoj ĝuste dum la krizaj periodoj. Finfine sennomaj torturoj estas frukto de kolektivaj kutimiĝoj, por kiuj ni estas iloj kaj kompli-coj. Kaj ni demandas: ĉu eks-proprietigi la homojn de iliaj tempo, sereneco, ĝojo, libero entrepreni, havi avantaĝojn de la laboro, estas neeviteble? Senigi ilin je libera ĝuo de la naturo, kies poluadon estas neeble eviti, kaj tiel ili fariĝas kunkulpuloj, estas neceso propra de la civila vivado?

Ĉu la persistado kaj akriĝo de la dramo de turmentita kaj riskoplena pluvivo, estas kaŭzataj de senkapablo pri projektado kaj organizado, aŭ de objektivaj malfacilaĵoj, aŭ ia perversa plano? Ĉu ekzistas la Sinjoroj de la Malsato kaj la Sinjoroj de la Tempo? Kaj kiu povus esti ilia vera celo? Se la Sinjoroj de la Malsato kaj la Sinjoroj de la Tempo ekzistas, kiuj estas la ankoraŭ nun nesonditaj dinamiko de ilia psikologio, malsame evoluinta preter nia imago? Ĉu la temo ne interesas la artistojn?

KIU RAJNAS PARTOPRENI

Ĉiuj plenkreskuloj, el nia planedo.

KIEL PARTOPRENI

Fako A: rakonto aŭ ĵurnalisma enketo.

Oni skribu historion, esence veran, aŭ ĵurnalisman artikolon; pure fantazian rakonton aŭ tea-

tran verkon. Sufiĉas sendi kvin ĝis dek paĝojn kun po ĉirkaŭ preskaŭ dumil tajperoj paĝe, inkluzive spacojn, per retmesaĝo al: samideano@hotmail.it.

Fako B: Fotografio

Estas ankaŭ bonvenaj fotoj trafe ilustrantaj la temon: tiuj povas portreti realaĵojn, aŭ fantastajn kunmetaĵojn, kiuj havu elvokivan kaj simbolan forton. Same kiel la literaturaj verkoj, ankaŭ la fotoj devas esti neeldonitaj kaj same senditaj interrete, en altdistingkapbla formo. Bonvolu sendi tri ĝis kvin (maksimume) fotojn al la supre indikita ret-adreso.

Por pliaj klarigoj kaj por ricevi aliĝilon skribu al:

villaggiodellelettere@hotmail.it

Por kromaj informoj, vizitu la paĝaron: <http://iconcorsidisamideano.alter-vista.org/>

LINGVOJ La verkoj povos esti en la itala lingvo aŭ Esperanto.

PREMIOJ Al ĉiuj aŭtoroj de la fotoj kaj verkoj elektitaj estos donacitaj de la Itala Esperanto-Federacio, Esperanta-itala vortaro; de Eva-Eldonoj, lernolibro pri Esperanto. Krome ili havos kvin kopiojn de la realigota libro kaj rekompencojn. Ili estos informitaj ĝustatempe pri la tago de la premiado.

Fine, minimuma celo estos la realigo de romano "Absoluta komploto: la Mastroj de la Tempo", konsistanta el kolekto da rakontoj kaj ilustrita per la elektitaj fotoj.

La verkoj devos alveni antaŭ la 22^a de oktobro 2013.

- "*Arbor Mendacium*", nome Arbo de l' Mensogoj. Temis pri tiu speco de arboj tre scivolemaj, kiuj subaŭskultas konversaciojn de la aliaj, kaj, je ekaŭdo de mensogo, ili ekproduktas frukton similan al pomo, sed speciala pomo, havanta ĉiujn kolorojn de la ĉielarko.

Tre babilemaj estis la arbaraj bestoj, kiuj elpensadis cent kaj cent da anekdotoj spicitaj per mensogoj, foje etaj foje egaj, nur por pavade paradi antaŭ la aliaj. Vulpino Arĝentvosta rakontadis, ke ŝia pelto estas nature tiel supla, dum – male – ĉiusemajne ŝi vizitis la faman frizistinon de la Blua Lago. Kaj eĉ ŝi klaĉetis pri la leono, malkaŝante ke ĉe ŝi li kolorigas rufe sian kolhararon ĉiun duan semajnon. Kokino Rapidpieda malmodeste fieris, ke ŝi kapablas flugi pli rapide ol falko, sed nur dumnokte, kompreneble, kiam la aliaj profunde dormas. La tre frandema urso Mielama organizadis debatojn, akuzante la abelojn pri strikoj, kio malpliigis ilian faradon de mielo: sed li ne diris, ke ĉiunokte li formanĝadis el ĉiuj abelujoj la ĉiutagajn produktitaĵojn!



Subaŭskultante tie, subaŭskultante tie ĉi, fine de la somero nia arbo estis tiom plena je fruktoj, ke tiuj komencis grandnombre fali grunden. La magiaj fruktoj, ektuŝante la teron, malfermiĝadis kaj el ili, ho mirindaĵo! elflugetis babilema papilietino, malkaŝanta la mensogon kiu naskis ŝin. Tial, iom post iom, ĉiuj arbaraj bestoj ekkoleris unu kontraŭ la alia, la arbaro transformiĝis en boksejon, ĝis kiam la maljuna vulpo Grandsaĝa kunvenigis ĉiujn bestojn ĉirkaŭ la arbo kaj: "Nia amiko arbo – li diris – deziris instrui al vi, ke mensogoj produktas nur aliajn mensogojn, kiuj povas flugi eĉ tre malproksimen, kie ili trovos ĉiam aliajn orelojn kiuj amuziĝos ilin aŭskultante".

Kaj post tio, kio okazis? En tiu sama nokto la mistera arbo malaperis, lasante la arbarloĝantaron pli saĝa kaj sincera.

(Anonimulo – trad. Elda)

Respondoj al demandoj pri Triesto:

- 1) "Clanfa" estas mara termino, responda al graplo, t.e. speco de malgranda ankro kun multe da brakoj, sed ĝi povas esti ankaŭ krampo aŭ huffero, probable devena el la germana vorto "Klampfe". En lerneja medio ĝi estas sinonimo de malbona noto.
- 2) "Area Science Park" estas prestiĝa multsektora Scienca kaj Tehnologia Parko, kie disvolviĝas aktivadoj de esplorado, evoluigo kaj navigado cele al atingo de elstaraj rezultoj, en kampo ekonomia kaj laborokupa sur la teritorio. La pruo tie troviĝanta apartenis al la ŝipo *Elettra*. Konstruita komence de pasinta jarcento, la ŝipo estis aĉetita de la italo *Guglielmo Marconi* [elp. Guljelmo Markoni] en 1921 kaj transformita en laboratorio: tie la sciencisto faris siajn nombrajn eksperimentojn pri radiotelefonio. Inter la 20-aj kaj 30-aj jaroj de la pasinta jarcento, la ŝipo navigis en ĉiuj maroj de la mondo, ĝis kiam, je la morto de *Marconi* (1937), ĝin aĉetis la itala Ministerio pri Komunikado. Kiam eksplodis la dua mondmilito, la ŝipo estis translokita al la haveno de Triesto. Septembre 1943 ĝi estis rekviziita de germanoj, kiuj ĝin ekuzis kiel militŝipon. En januaro 1944 la ŝipo navigis apud Zara, kie aliancaj ĉasaviadiloj bombadis ĝin. Oni redonis la ŝipon al Italio nur en 1962: tiam trenŝipoj transportis ĝin al la ŝipriparejo de *Muggia*, urbeto apud Triesto. Pro la tro altaj kostoj por ties restrukturado, ĝi estis malmuntita en diversajn partojn kaj tiuj partoj donitaj i.a. al *Area Science Park (Padriciano, provinco de Triesto)*, al la urbaj Mara kaj Poŝta k Telegrafa Muzeoj.
- 3) La *luganiga de cragno* [elp. Lujaniga de kranjo] aŭ *kranjska klobasa*, estas peklita porka viando, origine fumaĵita, produktita en Krainer, en la ĉirkaŭaĵo de Ljubljana, kiu fariĝis tradicia ankaŭ en Triesto. Temas pri miksaĵo de negrasa porka ŝultro (55%), negrasa bova viando (antaŭa parto, 15%), porka grasaĵo (30%), spicita per pipraj grajnoj, ajlo, papriko, muskato kaj salo.
- 4) La nomo estis "Conte di Savoia" (Grafo de Savojo). Ĝi estis transatlantika ŝipo kun longo de 248,25 metroj, konstruita en 1932. Estis la unua ŝipo sur kiu estis muntitaj grandegaj stabiligaj aparatoj (giroskopoj) celantaj malpliigi la ruliĝadon okaze de malbona vetero.

Atentigo!

Ekde la 1^a de julio ĝis la fino de aŭgusto la sidejo estos fermita. Vin atingos kompreneble la TEA-Bulteno, ĉifoje kun pli da akurateco. Sed jam nun bonvolu noti en vian kalendaron ĉi rendevuon: **dimanĉon la 21^{an} de julio, ekde la 18^a horo, ĉiuj ĉe Anita** - ŝi varme nin invitas por kunestado plezuriga, amika, amuza kaj esperant-tema.

Bonan feriadon al vi ĉiuj kaj ĝis la revido ĉe TEA-sidejo vendrede la 7^{an} de septembro!

BULTENO de TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO

Redaktanto: Elda DOERFLER - testudo.ts@gmail.com

Sidejo: Via del Coroneo 15 - Trieste - marde 17-19; vendrede 19-21

Tel: (+39) 345 2490291 - 040 350093; 339 2226936

Ret: esperantotrieste@yahoo.it; nored@tiscali.it

Grupa tt-ejo: //it.groups.yahoo.com/group/

Associazioneesperantistatristina - www.esperantotrieste.it

Poŝta adreso: Via del Coroneo 15 - IT-34133 Trieste - Italio

Poŝtĉekkonto N° 10834349

Maja Programo

14.a, mardo	16h00 - Unua- kaj dua-gradaj kursoj
17.a, vendredo	20h00 - Videofilmo pri Zagrebo kaj Ljubljana 2011
24.a, vendredo	20h00 - El la Esperanto-Gazetaro
26.a, dimanĉo	11h00 - Vizito al s-ino Trampus en Kaŝtelir kun niaj amikoj el Rijeka
27.a, lundo	14h40 - Esperanto en alirprogramoj Rai Uno: Moresnet, teritorio dediĉita al amikeco
28.a, mardo	16h00 - Unua- kaj dua-gradaj kursoj
31.a, vendredo	Sidejo fermita - Ekde la 18-a horo en Izola, ĉe la kultura Centro, por akcepti konferencanojn
Junia Programo	
1.a, sabato	17-a Esperanto-Konferenco de
2.a, dimanĉo	Triestanoj invitas viziti Trieston!
4.a, mardo	17h00 - Unua- kaj dua-gradaj kursoj
7.a, vendredo	20h00 - La bona lingvo: tiklaj vortoj el la libro de R. Corsetti "Esperanto estas facila"
11.a, mardo	17h00 - Unua- kaj dua-gradaj kursoj
14.a, vendredo	20h00 - Gramatikaĵoj el la itala revuo "L'Esperanto"
18.a, mardo	17h00 - Unua- kaj dua-gradaj kursoj
21.a, vendredo	20h00 - La ĉarma Triesto k mirinda Karsto: fotoj de Elda
25.a, mardo	17h00 - Unua- kaj dua-gradaj kursoj
28.a, vendredo	20h00 - Somera Festo!

Kvizioj de Viglo

Viglo proponas al vi eĉ du divenludojn: ĉu vi kapablos eltrovi la ĝustan respondon al ĉi du kaprompiloj?

Nekredeble!

Malgrande elstaras surkape de l' birdo
Kaj ege sonoras proksime de kruvojo.

Simplas, ĉu ne? Nu, mi iom helpas vin: temas pri 4-litera vorto!

Cerbumu,
cerbumu...

LI-VE-RI

Per enŝovo de la tri silaboj de la supra vorto post la unua silabo de la ses subaj, eblas estigi samnombrajn novajn vortojn.



AĜO - BALO - BRETO
KAFO - OFICO - SERO

Atentu: sama silabo uzeblas nur en paro da novaj vortoj.

Solvo aperos en la venonta bulteno: estos lotumita interesa premio inter la divenontoj!